

Rasismo, 2-a parto

Claude Gacond, 62-a radioprelego, 1964.02.05 & 08

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la rasismo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Mi prezentis lastan semajnon John Howard Griffin, kuraĝan blankulon el Usono, kiu kolorigis sian haŭton kaj dum ses semajnoj serĉadis en la sudo de sia lando laboron kiel kulturita nigrulo.

S-ro Griffin estis tre bone dokumentita pri la rasapartiga problemoj. Sed kiel vi konstato, la realo estis multe pli infera, ol li pensis.

La unua averto de la nigruloj, kiujn li kontaktis en la nigrul-kvartalo de Nov-Orleano, rilatis al la necesejoj. Oni konsilis al li ne foriri tro malproksime de la labor-loko aŭ loĝ-loko pro la risko devi piede trairi la tutan urbon sen trovi necesejon por nigruloj. Estas rafinaĵo, kiu kruele devigas la nigrulojn eviti ekskursi el sia getto. Se tio fariĝas necesa, ili devas urini aŭ eĉ feki en la stratoj mem. Poste la blankuloj raportas pri la malbona edukado de la nigruloj !

Dum longdaŭra busveturado inter Nov-Orleano kaj Hattiesburg en la ŝtato Mississipi ekzistas haltejoj, por ke la vojaĝantoj povu dum dek minutoj iri al la necesejo. Jen kio okazis al s-ro Griffin dum tiu vojaĝo al tiu urbo. La busestro post la eliro de la lasta blanka pasaĝero subite fermis la pordon. Li simple malpermesis al la nigruloj iri al la necesejo. S-ro Griffin diras : « Mi malfacile povis kredi, ke homo rajtis, en epoko de libero, rifuzi al la aliaj fundamentajn necesojn kiel la povo trinki akvon aŭ viziti necesejon. Mi ne plu sentis min en Usono, sed havis la impreson vivi en stranga lando, kie floradas la malbela. En la aero sentiĝas tensio kiel konstanta minaco, kiun oni ne kapablas difini. » (Fino de la citaĵo.)

Dum ni parolas pri busoj, mi menciis alian aventuron pripensitan. Estas post laciga tago. Ni troviĝas en buso de Nov-Orleano. S-ro Griffin premas por anonci al la busestro sian deziron eliri ĉe la venonta haltejo. La buso haltas, la pordo malfermiĝas, sed kiam s-ro Griffin atingas ĝin, ĝi subite refermiĝas. S-ro Griffin devos atendi alian haltejon por eliri. Kaj tiu ludeto rekomenciĝis ĉe la du sekvaj haltejoj sen reago de la blankaj pasaĝeroj. Estas rafinita ludo, ne de kato kun muso, sed de blankulo kun nigrulo !

Dum multaj semajnoj s-ro Griffin serĉadis laboron kiel tajpisto, sekretario aŭ librotenisto, sed ĉiam oni komprenigis al li, ke tiujn postenojn oni rezervas al blankuloj. En la restoracio de la Kristana Asocio, kie li renkontis multajn kulturitajn nigrulojn kaj kie la ĉeftemo de la konversadoj rilatis la « problemon », tio signifas la rasapartigon, li ofte aŭdis diri : « Ni ne estas instruitaj, ĉar ĉu mankas al ni la necesaj rimedoj por instruiĝi, ĉu pro tio, ke instruoj tamen ne ricevas labor-oficojn. » Ili ankaŭ diris : « Ni troviĝas en ensorĉita cirklo, kaj ne scias kiel eliri ĝin. La blankuloj humiligas nin, kaj poste riproĉas al ni nian subemon. »

Tagon post tago, eĉ foje minuton post minuto, s-ro Griffin devis renkonti la malaman rigardon de la blankuloj, vidi ekzemple ĝiĉetistinojn, kiu unue rifuzas vendi al li busbileton, kaj poste, ĉar li atendadis, kiu ĵetas la bileton kaj la monon teren dum ŝia vizaĝo esprimas naŭzon. Li devas forlasi benkon en publika ĝardeno, ĉar blankulo, kiu sidas ĉe la alia flanko de la ĝardeno sur alia benko, trankvile faldas sian gazeton kaj venas lin inviti forlasi la ĝardenon. Se li rezistus, la blankulo furioziĝus, policanoj venus kaj tuj malaperigus la nigrulon. Kaj estas ĝardeno permesata al nigruloj. Li devas preterpasi la montrofenestrojn de centoj da restoracioj kaj preskaŭ malsati, ĉar ili ĉiuj estas malpermesataj al la nigruloj. Mi citas lin : « En momento de distro mi haltis antaŭ restoracio por tralegi la menuaron. Mi legis, sciante, ke kelkajn tagojn antaŭe mi estus povinta eniri kaj mendi ĉiujn pladojn deziritajn. Sed nun, kvankam mi estas la sama viro, kun la sama malsato kaj la samaj gustoj kaj la sama monujo, neniun povo en la mondo estus povinta min permesi eniri tiun lokon por manĝi. Revenis al mia memoro diro de nigrulo : « Vi povas vivi tie ĉi la tutan vivon, vi tamen neniam eniros grandan restoracion, escepte kiel kuirhelpanto. » (Fino de la citaĵo.)

Rasismo, 2-a parto
Claude Gacond, 62-a radioprelego, 1964.02.05 & 08

Antaŭ ol komenci tiun eksperimenton s-ro Griffin sciis, ke ĝi estos terura. Sed vidi siajn samrasulojn lin konstante malafable rigardi, ĉar nur lia haŭto havas alian koloron, tio superis lian rezist-kapablon. Kaj tiu sento de senelireja sufero kondukis lin senesperigi, kiel senesperigas la aliaj nigruloj.

Ni citas : « La planko de mia ĉambro knaris sub miaj piedoj. Mi lumigis kaj rigardis la frakasitan spegulon fiksitan kontraŭ la muro per kurbigitaj najloj. Mi vidis speguliĝon de kalva nigrulo, kiu min fikse rigardadis. Mi komprenis, ke mi troviĝas en infero. Infero ne povus esti pli soleciga kaj malesperiga, nek pli kruele malproksima al ordo kaj harmonio. Mi aŭdis mian voĉon, kiel se ĝi apartenus al iu alia. Ĝi sonadis en la malplena ĉambro kiel abstrakte : « Negro, kial vi staradas tie, ploranta ? » Mi vidis larmojn gliti sur liajn vangojn. Kaj mi aŭdis min prononci parolojn, kiujn mi tiom ofte aŭdis diri el aliaj nigruloj : « Tio ne estas justa. Tio simple ne estas justa. »

Dum tria elsendo ni konklude ankoraŭfoje parolos pri tiu libro *En la haŭto de nigrulo*. Do ne forgesu aŭskulti Radio-Svislandon.

Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-